Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 23-an de oktobro 2024 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 19-an de septembro 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis kun etaj ŝanĝoj. Aprobiĝis ankaŭ tiu de la 30-a de majo 2024.

**3. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko**
Jardar ankoraŭ ne ricevis respondon de la Nacia Biblioteko al siaj printempaj leteroj, kiuj koncernas Norvegan Esperantiston en la Nacia Biblioteko. Jardar ankoraŭ pli aktive provos ricevi respondon de la Nacia Biblioteko.

**4. Esperantonia**
Venis longa, skriba respondo de la Esperanto-Centro de Herzberg al nia letero pri la vizito de iliaj reprezentantoj Peter Zilwar kaj Zsofia Korody al Esperantonia en septembro. La respondo enhavis ĝeneralan priskribon de tio, kion ili forportis al Herzberg, kio ĉefe estis mankantaj ĉe ili ekzempleroj de libroj kaj aliaj materialoj de la kunvenĉambro.

Claude laborigos kelkajn junulojn en Esperantonia dum OD-dagen, la 1-an de novembro. Ili ĉefe laboros por prizorgi konservadon de certa nombro da jarkompletoj de Norvega Esperantisto.

**5. Eventualaĵoj**
- Claude prizorgos la monon de NJE (rigardu la protokolon de la 30-a de majo).
- Claude sendos la lernolibron «Esperanto – den direkte metoden» al la kursanoj de la interreta kurso (rigardu la protokolon de la 30-a de majo).
- Claude sendos leteron al la kluboj pri klubaj jarraportoj.

**11. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos ĵaŭdon la 21-an de novembro 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund